

PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10432-04 Paris

4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS

tél 278 68 86

NOVEMBRE - DECEMBRE 1974

N° 12

Chers Amis

Permettez qu'à chacun d'entre vous je pose cette question :

Pourquoi vous intéressez-vous à l'Espéranto ?
Par des voies diverses vous l'avez découvert.
Ici, un ami vous a vanté les merveilles de la langue internationale.

Là, un article lu dans unes de vos revues préférées vous a incité à vous documenter au siège de l' U.F.E.

Ailleurs, une affiche annonçant les cours d' Espéranto dans votre commune a décidé de votre vocation espérantiste.

Tel d'entre vous est venu à l'Espéranto à cause des avantages qu'il peut procurer : facilités pour visiter les pays étrangers, plaisir de correspondre avec des amis du monde entier ou de collectionner des timbres-poste....

Tel autre a subitement été ébloui par l'impact universel de l'Espéranto, moyen nécessaire parmi d'autres pour faciliter l'unification pacifique de l'humanité.

Encore une fois, chers Amis, pourquoi vous intéressez-vous à l'Espéranto ?

Venez-vous à lui avec l'espoir...ou le désir d'en recevoir plus que vous ne lui en apporterez ?

Alors, attention, vous faites fausse route !

L'Espéranto, cette langue créée par un homme de génie au cœur bon, "intelligemment" intelligent, l'Espéranto, dis-je, mérite autre chose.

Zamenhof a donné l'exemple du bon sens, du don de soi, de la tolérance, de la largeur d'esprit, d'une persévérance toujours axée vers le but à atteindre.

Ce modeste, qui ignorait la morgue, était un homme de courage. Le désir, né dans son cœur d'enfant, de créer une langue qui devait unir les hommes, ne l'avait jamais quitté.

Quel exemple nous donne cet homme, à nous qui patageons au milieu de toutes les valeurs

désordonnément mélangées de notre époque dite de progrès !

Comparez la cohérence de la vie de Zamenhof à la vie de girouette que mènent tant de nos contemporains.

Eh bien ! La cause de l'Espéranto progressera dans la mesure où nous agissons de la manière dont Zamenhof agirait s'il était encore parmi nous.

Alors ? Secouons-nous et en avant !

Roger Desrinéy

Karaj Geamikoj,

I - En majo mi ricevis propagangfolion de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (Belga sekcio) pri la temo :

" Eŭropa Dokumentaro ", eldono de E . K . C (Eŭropa Kultura Centro).

Tiu Centro (kiu kunlaboras kun Eŭropa Asocio de Instruistoj kies membroj estas ĉ. 35000 en 12 landoj), proponis eldoni dokumentojn en Esperanto; ĝis nun ili aperis nur en la franca kaj en la angla.

Tamen por daŭrigi tiun eldonon en 1975 bezonas trovi minimume 500 abonantojn.

II - En la oktobra numero de " Esperanto " oni povas legi la publikan leteron al la Eŭropa esperantistaro. El ĝi jen kelkaj partoj:

" ESPERANTO EN LA LERNEJOJN ! Tiun sloganon ni jam aŭdas dum pluraj jardekoj ...

(daŭrigo ĉe paĝo 3-a)

UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO
4bis, rue de la Cerisaie 75004 Parizo
9.00 ĝis 12.00 H -o- 14.00 ĝis 17.00 H
krom dimanĉe kaj lunde

Dimanĉon 9-an de MARTO 1975
okazos la 52-a Pariza Federacia Kongreso
en ENGHIEU-les-BAINS, ĉarma urbo, kiun
prezentas al vi S-ro J.L. Saudian-Rousseau

K O T I Z O J

Kiel kutime la kasisto afable memorigas al la membroj, ke la kotizoj 1975 estas jam pageblaj; tio faciligos la laboron de la nacia kasisto. Malgraŭ la plialtigo de la kotizoj, ni tamen konservis tiun por "simpla membro" kiu ebligas pagi sen tro da zorgoj ankaŭ por sia kunul(in)o : edzo, edzino, eĉ parenco, ktp

U.F.E.

Membre adhérent 9 F.
Membre TITULAIRE (ricevas la revuon "Franca Esperantisto") 60 F.

U.E.A.

Membre "jarlibro"..... 44 F.
Membre "Abonanto" (ricevas la revuon "Esperanto")..... 88 F.

(les cotisations U.E.A. s'ajoutent à celles de U.F.E.)

La membroj de Grupoj pagu al la kasisto de sia grupo :
(Ekz. : la membroj de la Pariza Grupo devos pagi al : Groupe Espérantiste de Paris CCP 806 266 PARIS, aldonante la kotizon de tiu grupo - vidu la bultenon de la Pariza Grupo)

La izolitaj membroj pagu al "Fédération Parisienne Espéranto" CCP 10 482 04 PARIS.

La pago de nedevisa elspezo devas alporti ion: tiel farinte, vi eniras en la grandan familion de tiuj, kiuj jam trovis la solvon por la lingva ĥaoso!

Krome, vi rajtas depreni tiun sumon el via jara deklaro pri personaj enspezoj. (pagoj al klerigaj asocioj).

**** La malpli ol 25-jaraj gejunuloj sin turnu al J . E . F . O . ****

KONSILIO DE LA PARIZA FEDERACIO ***

La Konsilio havis kunsidon la 28-an de septembro 1974. El la diversaj punktoj de la tagordo ni eltiru la jenon :

S-ro J. Rousseau raportis antaŭ la konsilianoj pri la okazintaĵoj de Hamburgo, kiuj kondukis al la ekŝiĝo de Prof. Lapenna post dek jaroj de prezidenteco, kaj konsekvence nomumo de nova estraro.

Tiu situacio estis jam diskutita dum la konsilia kunveno de U.F.E. (7/9) el kio sekvis la ekŝiĝo de la tiama estraro de U.F.E. kaj nomumo de nova.

S-ro J. Thierry refaris antaŭ la federacia konsilio la proponon jam faritan antaŭ la konsilio de U.F.E. t.e. ekŝiĝo el U.E.A., ĉar laŭ lia opinio, la elektoj en Hamburgo ne estis demokrate faritaj kaj nun U.E.A. ne plu estus neŭtrala.

Ni tamen devas informi ke la nova prezidanto de U.E.A. D-ro H. TONKIN estis jam de kvin jaroj antaŭvidita de Prof. Lapenna kiel lian anstataŭonton!

La propono de S-ro J. Thierry ricevis 7 voĉojn POR kaj 7 voĉojn KONTRAŭ (el 14 voĉdondantoj). Antaŭ tiu rezulto la Konsilio iris nure al sekvanta punkto de la tagordo.


.....
La Federacia Kongreso okazos la 9-an de Marto 1975 en Enghien-les-Bains dank'al la klopodoj de S-ro J.L. Saudian-Rousseau. La kongresejo estos en la Festa Salonego de la urbo, kiĉ ankaŭ la kongresanoj povos tagmanĝi.

La aliĝkotizo estas (nun) fiksita je 15 F. (simpla aliĝo) kaj je 60 F. (aliĝo kun tagmanĝo). Ties aliĝilo estos aldonita al la januara bulteno de la federacio.

Jack Rousseau

-o-o-o-
-o-
o

Niaj geamikoj BENAZECH (Parizo)
plezure anoncas ke filo Stephane, naskiĝis
la 14-an de septembro 1974



ENGHIEN _LES_ BAINS

ENGHIEN-les-BAINS, kie okazos la venontjara federacia kongreso, situas ĉirkaŭ dek kilometrojn norde de Parizo; ĝi estas agrabla, kvieta urbeto, kies plej trafa allogaĵo estas la granda lago. Sur ĝi krozas ĉiun belveteran dimanĉon vel-, rem-, kaj eĉ pedal-boatoj (feliĉe motor-boatoj estas malpermesitaj!)

Apud la lago troviĝas la Kazino, kie vi povos perdi vian ĉemizon, aŭ...(kial ne ?) iĝi riĉa kiel Krezo; kaj - pli utila laŭ mi - la Termobanejo, kie estas kuracataj diversaj malsanoj : reŭmatismo, afekcioj de la nazo kaj gorĝo, ktp.

Ankaŭ menciinde, likvor-distilejo GARNIER.

ENGHIEN-les-BAINS estas facile alirebla de Parizo per elektraĵ trajnoj, kiuj for-lasas la Nordan Stacidomon ĉiun kvaronon de horo (daŭro de la veturado : 14 minutojn) aŭ per aŭtomobilo (preferinde eliru el Parizo tra la "Porte de Clignancourt")

J.L. SAUDIAN - ROUSSEAU

daŭrigo de la paĝo 1-a

"Ĉu ĉiuj esperantistoj vere deziras enkondu-kon de Esperanto en lernejojn ? Ĉu ili ek-zemple estas pretaj elspezi monon por ebli-gi tiun enkondukon en lernejojn de Eŭropo ?
"Ŝajne ne ! Por garantii la eldonadon de
"Eŭropa Dokumentaro" necesas 500 abonantoj
"je la 1-a de januaro 1975. Hontinda fakto
"estas, ke je la 1-a de septembro estis nur
"268 abonantoj !

La tuta letero detale montras ke la eŭropaj instancoj ne povos interesiĝi pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn se la esperant-istoj mem ne interesiĝas !

"Esperanto en la lernejojn" ne plu estu slo-gano; ĝi fariĝu realeco. Vi elspezu 16 fran-kojn por abono de " Eŭropa Dokumentaro", kiu aperas kvarfoje jare.

Tiel vi helpas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

Pagu al U.F.E. 4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris . CCP 855-35 PARIS .

R.D.

-O-


P H I L A T E L I E

-O-

Le Club Philatélique du Perreux organise une exposition qui se tiendra les 9 & 10 Novembre à la Salle des Expositions
70 ter, av. Ledru - Rollin au Perreux .

Le Centre Culturel d'Espéranto du Perreux y présentera 4 panneaux sur le thème :
" Oblitérations de Congrès Espérantistes Internationaux dans des pays d' Europe " .

KONGRESU
KUN NI



Pasporta
Servo

en Mantes-la-Jolie

ESTAS LA GASTIGA SERVO DE
TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

J.E.F.O. INVITAS ĈIUJN GEJUNULOJN
AL SIA ĈIUJARA RENKONTIĜO :

de la 27-a de Marto ĝis la 2-a de aprilo
1 9 7 5

Por pliaj informoj skribu al :

Junulara Esperantista franca Organizo
(J.E.F.O.); 4 bis, rue de la Cerisaie
75004 - P A R I S

KIEL FARIĜI G A S T I G A N T O ?

KIEL FARIĜI G A S T O ?

POR 1 9 7 5

Por pliaj informoj skribu al :

S-ino J. M. C A S H ;
72, rue de Rennes ,
75006 - P A R I S

INTERNACIA ESPERANTO KLUBO AUTOMOBILISTA

I . E . K . A .

JARA KUNVENO, la 31an de Julio 1974 en Hamburgo. (eltiraĵoj de la raporto)

-O-O-O-O-

Pro la foriro al Brezilo de la prezidanto, S-ro G. GRATAPAGLIA, lia salut-letero estis legata :

"Mi elkore salutas ĉiujn geamikojn, kiuj subtenas nian agadon ĉe la aŭtomobilismo-havaj medioj. Mi firme kredas, ke por la disvastigo de nia ideo, la fakaj Asocioj ludas esencan rolon nepre ne preterlasendan. eĉ malgranda paŝo kaj modesta atingo sur la praktika kampo estas preferinda al sterilaj polemikoj!
"....Ni ne forgesu, de tempo al tempo, skribi al FIAT en Esperanto, peti materialon, utiligi ĝin kaj montri, ke ekzistas aŭtomobilistoj, kiuj uzas Esperanton.
" Mi deziras al ĉiuj bonan laboron por la atingo de nia komuna celo.

La firmo FIAT sendis al kongreso 2500 vortaretojn, en la formato 12x18 cm, kiuj enhavas ĉ. 400 terminojn kaj kompletajn

frazojn tre utilajn dum aŭtomobil-vojaĝoj. La lingvoj estas : la angla, la franca, la germana, la hispana, la itala kaj Esperanto.

La membroj de I E K A sumas nuntempe je 810 en 28 landoj. (En Francujo : 149).

Jen la nova estraro elektita en Hamburgo:

Prezidanto : Werner BORMAN

Vicprezidanto : Raif MARKARIAN

Ĝenerala Sekretario : Jean GUILLAUME

Tiu klubo meritas havi plurmilojn da membroj.

Por esti dumviva membro sufiĉas pagi la modestan kotizon, kiu rajtigas ricevi la specialan aŭtomobil-insignon. (6 F.).

Sin turni al :

S-ro Jean GUILLAUME , Résidence de Grasse
N° 66 - 78810 FEUCHEROLLES.

-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-